

# Legalerno

## Ĝenerala antaŭplana priskribo de la instrua retejo

**Formo:** retejo

**Nomo:** LegaLerno

**Adreso:** [legalerno.esperantejo.com](https://legalerno.esperantejo.com)

**T-grupo:** <https://t.me/+TIjKuGV5DIRmY2Qy>

**Gvidanto:** Tatjana ([https://t.me/Tatjana\\_3472](https://t.me/Tatjana_3472))

**Teknika administranto:** Andreo (<https://t.me/thetumbleweed>)

## Celo

LegaLerna celo estas legaĵoj en Esperanto kun nacilingvaj klarigoj por lernantoj.

## Interfaco

LegaLerno celas al ĉiuj niveloj de lernantoj, kaj strebas doni plej komfortajn kondiĉojn por studi la Lingvon.

Reteja interfaco estas nacilingva kaj ebligas lernantojn laŭvole uzi unu de haveblaj interfacaj lingvoj. Komence tiuj estas Rusa, Esperanto kaj Angla.

Ĉiuj tekstoj estas prezentataj en Esperanto, traduko kaj instruaj notoj estas prezentataj en la lingvo de interfaco, registritaj lernantoj povas elekti interfacan lingvon kaj lingvon de traduko nekongruan unu al la alia se ili tion volas.

Komence estas nur unu lingvoparo: Esperanto-Rusa, ĉar projekto estas startita per la Rusa instruisto por la Ruslingvaj studentoj.

La sistemo ebligas doni tradukojn kaj instruajn materialojn/komentojn en iu ajn lingvo.

**Dezirantaj prepari tradukojn en iu nacia aŭ artefarita lingvo estas bonvenaj. Same kiel aŭtoroj de tekstoj en iuj ajn lingvoj.**

## Prezento da materialoj

Materialoj estas organizataj en libroj kaj ĉapitroj.

Libroj havas nomon, priskribon, kaj - laŭdezire - kovrilbildon.

Ĉapitroj enhavas malgrandajn tekstojn, kaj tradukojn en diversaj naciaj lingvoj kun necesaj instruaj notoj.

Tekstoj en ĉapitroj estas prezenteblaj diversmaniere laŭ la preferoj de lernantoj:

1) Plene Esperanta teksto, traduko aperas super frazoj kiam muso estas movata super ili.

2) Frazo-post-frazo: frazo en Esperanto estas sekvata per traduko kaj instruaj notoj en nacia lingvo.

3) Teksto-post-teksto: la tuta teksto estas prezentata en Esperanto, post tiu traduko kaj instruaj notoj estas prezentataj.

Ĉapitraj paĝoj havas sube komentsekcion; lernantoj povas lasi iuj ajn komentoj kaj demandoj pri la teksto.

Krome, ĉapitroj povas havi son-dosieroj aldonitaj por aŭskulti.

Aldone ĉapitroj havas ŝat-sistemon kaj grad-sistemon por lernantoj taksii materialojn.

Sistemo ne havas iun kategorian (arbar-vidan) sub-sistemon. Anstataŭ sistemo havas "nebulan" katalogan sub-sistemon tra etiketoj.

Etiketoj reflektas malfacil-nivelon de libroj/ĉapitroj kaj aliaj aspektoj kiel temoj, aĝ-limigiloj, ktp.

Organize, aŭtoro havas eblecon publikigi librojn kaj/aŭ ĉapitrojn tuj, aŭ doni al ili "skizan" statuson, kaj daŭre prilabori kaj publikigi kiam materialoj estas pretaj.

Krome, por ĉiu libro kaj/aŭ ĉapitro eblas indiki daton (estontan) kiam ĝi devas esti publikita. Kaj, se dezirata, dato por malpublikado.

## Registrado

Oni ne bezonas registriĝi ĉe la retejo por uzi ĝin.

Registrado donas aldonajn eblecojn, kutime postulatajn uzi kuketojn.

Tiel, registritaj lernantoj povus:

- 1) Fiksi interfacan lingvon laŭplaĉe en sia profilo.
- 2) Fiksi traduklingvon laŭplaĉe sen bezono fari tion ĉiuvizite.
- 3) Fiksi prezentmanieron laŭplaĉe sen neceso ŝanĝi ĉiuvizite.
- 4) Komentu librojn kaj apartajn ĉapitrojn.
- 5) Ŝati kaj malŝati ĉapitrojn.
- 6) Gradi materialojn.
- 7) Ordoni periodan sendon de novaj materialoj (potage, posemajne, ktp.) al sia retpoŝta adreso/Telegrama adreso, ktp.
- 8) Ricevi aŭtentigojn al sia retpoŝto/Telegrama konto pri apero de novaj materialoj.
- 9) Marki jam legitaj partoj por klare vidi, kio ankoraŭ ne estas legita.

## Sociaj retoj

LegaLerno estu firme ligita kun Telegramo.

Lernantoj povas aŭtentikiĝi uzante sian Telegraman konton sen bezono registriĝi en la retejo mem.

Kiam novaj ĉapitroj estas publikataj, tiuj aŭtomate estas publikataj ankaŭ en la LegaLerna Telegram-grupo.

Registritaj lernantoj povas ordoni aŭtentigojn pri novaj materialoj al sia Telegram-konto.

Estonte abla estas kunigo de LegaLerno kun aliaj sociaj retoj kaj rapidmesaĝiloj.

## Teknikaĵoj

LegaLerno retejo estas programata en la PHP programlingvo uzante kurantan (la 10-an) version de Laravel frejmvorko.

Laravel pakaĵo estas Laravel+Livewire+Jetstream+Alpine.

Interfaca frejmvorko: Tailwind.

Databazo: MySQL.

# Ekzemplaj antaŭplanaj interfacoj (retejaj paĝoj)

Hejma paĝo estas kutime kompleksa kaj inform-orientata.

Legalerna hejma paĝo estos desegnata laŭtempe, ĉar ne rekte rilatas al la lern-materialoj.

Ekzemplo de la Libra paĝo:

Ekzemplo de la Ĉapitra paĝo.

Noto: ĉi tie teksto estas prezentita en la “frazo-post-frazo” maniero, tamen defaŭlta maniero estos nur Esperanta teksto kun traduko aperanta super frazoj kiam muso estas movata super la frazo.

Noto 2: Pliaj instrumentoj estos aldonita al la Ĉapitra paĝo, kiel ŝat-butono, indikilo de libro-ĉapitro legata supre (“breadcrumbs” en la Angla), etikedoj, komenta formo, kaj aliaj.